

La Karavelo

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

n-ro 019
decembro 2009



6-foje jare

Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007



Florbelá Espanca

(1894 - 1930)

omaĝo al la alenteĝa pasiema sonetisto



LK-Regularo

1. Ĝeneralajoj: La Karavelo (LK) estas literatura esperanto-revuo editata de la editejo La Karavelo. Ĉiuj LK-kunlaborantoj kunlaboras kun LK en sistemo de amika rilato, sen monaj profitoj, kun minimumaj maklerajoj aŭ sen ili. La agado de LK kaj ĝia rilato kun la kunlaborantoj, kaj kun aliaj homoj kaj organizoj, gvidiĝas de ĉi tiu dokumento, ŝanĝota ĉiam, kiam necese, kaj ekvalida tuj post publikigo en la lasta numero de la LK-revuo, sen alia informo. La kontakto inter la kunlaborantoj de LK efektiviĝas pere de retaj mesaĝoj. Ĉiu kunlaboranto devas aparteni al la diskutgrupo de LK, prestiĝi la laboron kaj la nomon de La Karavelo, kaj strebi al kompetenta rego de nia lingvo esperanto.

2. Verkistoj: Kunlaboras kun LK nekonstantaj verkistoj kaj konstantaj verkistoj. Konstanta verkisto estas invitata de LK por tio, kaj li devas publikigi jare minimume kvar artikolojn en la LK-revuo. Ĉi tiuj rajtas ricevi senpage la jaran paperan version de LK, kiam kaj se ĝi aperos. Se ne eldoniĝos papera versio, ĉiu kunlaboranto rajtas ricevi paperan dosieron similan al tio. La verkistoj devas liveri, al la LK-redaktejo, siajn verkojn por publikigo laŭ la jenaj reguloj: **a)** Uzante la ŝablonon nomitan LK_ŝablono_por_verki.doc, kiu estas elŝutebla el la retejo de LK. **b)** La tekstoj estu en formato .odt aŭ .doc. **c)** La verkisto bv. venigu kune kun sia artikolo bonkvalitajn bildojn en .jpg por ilustri ĝin. **ĉ)** La tekstoj devas esti nepre redaktitaj laŭ la esperanta alfabeto. Por tio, LK disponebligas la programeton Ek en sia retejo. **d)** Kun la unua kunlaboro, bv. la verkisto sendu sian etan biografion kaj sian foteton por sin prezenti al la legantoj. **e)** La verkistoj kiuj komencas nun kunlabori kun LK, legu la antaŭajn numerojn por agordi sian laboron laŭ la etoso de la revuo.

LK respektas la stilon de ĉiu verkisto. **La verkisto devas revizii sian propran tekston**, kiun la LK-stabon ne transformos, escepte, evidente, de misoj. Ĉi-afere la principo de La Karavelo estas: **la leganto legos kion la verkisto verkis**. Antaŭ ol la publikigo de ĉiu numero de LK, ĉiuj verkistoj ricevas retan ekzempleron de tiu numero, kiu estas nomata *Revizienda Versio 2 (RV_2)* (ekz.: LK_10_RV_2.pdf). La verkisto havas minimume 24 horojn por legi sian propran verkon lastfoje antaŭ ol la publikigo. Se la verkisto ne reagos al la sendo de RV_2, tio signifas ke implicite li aprobis sian verkon por publikigo kun la modifoj faritaj de la LK-stabo. Do, se la verkisto ne aprobas iun modifon, nepre li devas mesaĝi al la redaktisto por proponi ŝanĝojn. Se ne estos interkonsento inter la verkisto kaj la redaktisto, rilate al la modifoj proponitaj en RV_2, LK ne publikigos tiun tekston.

3. Aŭtorrajtoj: La verkistoj atentu la aŭtorrajtojn. Pri iu damaĝo rilatanta tiun aferon, responsas nur la aŭtoro de la artikolo. Nepre oni venigu paperan skribitan rajtigiton al la redakteja adreso de LK, por ke LK povu publikigi artikolon, kiu dependas de aŭtorrajtoj. Afabla aŭtoro, kiu permesas al la LK-verkisto publikigi la verkon, havas familianojn kiuj, post la morto de la afabla aŭtoro, eble tribunale dubos pri la afableco de sia familiano, kaj povas justice procesi kontraŭ la LK-verkisto. Nur la papera skribita permesilo en la adresa redaktejo de LK donas al ni la garantion, ke ne aperos problemoj kaŭzeblaj de bonaj intencoj. Manke de tio, estas preferinde traduki el tiuj aŭtoroj, kiuj mortis antaŭ pli ol 70 jaroj. Oni atentu, ke ankaŭ la tradukoj, la fotoj kaj la bildoj, i.a., havas aŭtorrajtojn.

Liverante siajn verkojn kaj tradukojn al La Karavelo por publikigado, la verkistoj donacas al La Karavelo la tutan rajton publikigi tiujn verkojn kaj ties tradukojn en iu ajn lingvo, en elektronika formato aŭ surpapere revuforme, libroforme aŭ alimaniere, laŭvole de la direktisto de LK. Ĉiuj aŭtorrajtoj apartenas al LK, se alia interkonsento ne okazas inter la verkisto/tradukisto kaj la LK-direktisto. La Karavelo ne estas devigata akcepti iun ajn verkon, kunlaboron aŭ kunlaboranton.

4. Reviziistoj: La Karavelo bezonas kelkajn reviziistojn por siaj diversaj sekcioj, por la revuo kaj por aliaj eldonoj, kaj podofaj (en formato PDF) kaj paperaj. Estas dezirinde, ke tiuj reviziistoj estu kompetentaj en la regado de esperanto kaj de literaturo ĝenerale. Krome, ili devas esti variaj inter si, laŭ la denaska lingvo, aĝo, sekso, nacieco, profesio k.a.

Jen ĉi tie la ĝeneralaj bazoj, sur kiuj fariĝas la revizia laboro en La Karavelo: LK ne serĉas samniveligon de lingva stilo inter siaj aŭtoroj, nek inter la diversaj verkoj de la sama aŭtoro. LK respektas la individuajn stilojn de ĉiu aŭtoro kaj de ĉiu verko. Tamen, ene de la sama verko, devas ekzisti kongruenco. Do, se la aŭtoro, ekzemple, skribas la nomon de nia lingvo jen majuskle jen minuskle, la reviziisto devas elekti unu el la formoj. La *Revizienda Versio 1 (RV_1)* estas pdf-versio sendata nur al la LK-reviziistoj, antaŭ ol la RV_2, por elsarko de misoj kaj eraroj. Okaze de RV_2, la aŭtoro aprobas aŭ malaprobas tiujn kaj aliajn eventualajn modifojn. PIV kaj la Reta Vortaro estas vidataj de LK kiel la ĉefaj vortaraj gvidiloj. Al LK ne interesas, ĉu vorto estas fundamenta, oficiala aŭ ne. Gravas ĉu ĝi aperas en tiuj du vortaroj, ĉu ĝi estas internacie komprenata, ĉu la neologismo estas utila, kaj ĉu la vorto, kvankam piva aŭ eĉ fundamenta, estas dezirata en nia lingvo, pro ĝia longo, pro konfuzo kun paronimo aŭ sinonimo, ktp. Sintakse LK akceptas iom da stila varieco, kondiĉe ke la sintakso ne tro foriĝu de la esperanta normo, ĝenerale akceptata de la esperanta tradicio kaj de la nuntempa esperantistaro. Nepre, oni ne forgesu, ke LK publikigas la verkon skribitan de la aŭtoro, kun minimumaj modifoj, se eble. Se la verko aperas tro stranga al la reviziisto, ĉi tiu devas komuniki tion al la redaktisto, kiu proponos al la aŭtoro la necesan reviziadon. La intenco de la reviziado ne estas la reskribo de la verko, sed nur la korektado de eraroj ne antaŭe viditaj de la aŭtoro. Poezion oni apenaŭ revizias, sed oni devas peti klarigon al la aŭtoro, se la poemo ne estas komprenebla post du aŭ tri legadoj. Bona reviziisto devas eniri en la etoson de la verko kaj proponi ŝanĝojn laŭ la spirito de la teksto kaj laŭ la stilo de la aŭtoro. La reviziado ne sin transformu en bazlerneja korektado, kiu ŝtelus tro da tempo al la reviziisto kaj al la redaktisto.

5. Anoncoj: La anoncanto devas doni la jpg-bildon.

Por 6 numeroj: en pdf kaj en la papera versio.

1/8 da paĝo: 200 € (8 cm X 5 cm)

1/4 da paĝo: 360 €

1/2 da paĝo: 680 €

1 paĝo: 1280 €

Ekzemplo de 1/8 da paĝo ⇨
Ω

Esperanto em 30 horas João José Santos

- ★ Língua: português europeu
- ★ Prefácio de Geraldo Mattos
- ★ A5 – 300 páginas – ilustrado
- ★ Manual com 25 lições
- ★ Guia Gramatical ★ Anexos
- ★ Vocabulário Esper.-Português
- ★ Vocabulário Portug.-Esperanto

25 euros mais portes de envio



kodo 05



LK-Katalogo



La Karavelo en A4-volumoj de 2007 - 2008 - 2009

- ★ Ĉiu volumo: ĉirkaŭ 6 revuoj
- ★ Kunlaboras Gerrit Berveling, Geraldo Mattos, Valentin Melnikov, Imre Szabó, Paulo Viana, Luiza Carol, ktp.

- ★ Kolora bindo – grizaj bildoj – bonkvalita presado
- ★ ĉiu volumo: **23 eŭroj plus sendokostoj**

kodo 01-07 / 01-08 / 01-09


Esperanto em 30 horas João José Santos



- ★ Língua: **português** europeu
- ★ Prefácio de Geraldo Mattos
- ★ A5 – 300 páginas – ilustrado
- ★ Manual com 25 lições
- ★ Guia Gramatical ★ Anexos
- ★ Vocabulário Esper.-Português
- ★ Vocabulário Portug.-Esperanto

25 euros mais portes de envio

kodo 05



Rakontoj por ĉiuj aĝoj Luiza Carol

- ★ A5 – 166 paĝoj
- ★ 26 bildoj de Luch Ofer
- ★ Belaj rakontoj por ĉiuj aĝoj

16 eŭroj plus sendokostoj

kodo 04



Zamenhof Um Cidadão do Mundo Djalma Pessata

- ★ Língua: **português** do Brasil
- ★ Cerca de 60 minutos
- ★ DVD com documentário sobre a vida de Zamenhof

16 euros mais portes de envio

kodo 03

Kie kaj kiel oni aĉetas la LK-varojn?

1. Preferinde aĉetu la LK-varojn en via esperanto-asocio aŭ en librovendejo en via urbo.
Se tio ne eblas, do aĉetu rekte al La Karavelo.
2. Plenigu la LK-mendilon, kiun vi trovos en la LK-retejo.
3. Pagu per unu el la sistemoj menciitaj en la LK-mendilo.
4. Sendu la mendilon kaj la pag-pruvilon al la LK-retadreso.
5. Atendu la aĉetitaĵojn en via adreso.
La varoj nur estos ekspedataj post efektiva pago.
6. Se vi havos dubojn, kontaktu per la LK-retadreso.
7. Mendante 6 samspecajn varojn, oni pagas 5.
Tiu kroma varo konsistigas la makleraĵon de la asocio aŭ homgrupo.
8. Ĉi-sube vi trovos la lokojn, kie nun vendeblas la LK-varoj.
Baldaŭ ĉi tiu loklisto ampleksiĝos.

ISRAELO

Telavivo

Esperanto-Ligo en Israelo jshemer@actcom.net.il

NEDERLANDO

Roterdamo

Universala Esperanto-Asocio librosservo@co.uea.org

PORTUGALIO

Estremozo

AtéJazz Café (kafejo) atejazzcafe@gmail.com

La Karavelo lakaravelo@gmail.com

Evoro

Intensidez (librovendejo) bibliocafe@intensidez.com

Lisbono

Portugala Esperanto-Asocio vendejo@esperanto.pt
Ω

http://eo.wikipedia.org/wiki/La_Karavelo

www.lakaravelo.com



Enhavtabelo

- | | |
|--|---------------------------------------|
| 1 Kovrilo: <i>Florbela Espanca</i> | <i>El la redaktejo</i> |
| 2 LK-Regularo | <i>El la redaktejo</i> |
| 3 LK-Katalogo | <i>El la redaktejo</i> |
| 4 Enhavo – Kolofono | <i>El la redaktejo</i> |
| 5 Ĉefartikolo:
<i>Ĉu vi ŝtelus libron?</i> | João José Santos |
| 7 Fernando Pessoa:
<i>Mesaço (38-a poemo)</i> | João José Santos |
| 8 Pico della Mirandola:
<i>el "Parolado pri la Homa Digno"</i> | Gerrit Berveling |
| 10 Florbela Espanca:
<i>Alenteça pasiema sonetistino (poezio)</i> | João José Santos
Neide Barros Rêgo |
| 14 Deomortigo (tragedia dramo) | Geraldo Mattos |
| 15 Poemoj pri La Karavelo | Nikolaj Neĉaev |
| 16 Włodzimierz Zagórski:
<i>Interparolo de ebrulo kun la Luno (poemo)</i> | Edward Jaśkiewicz |
| 17 Kiel Leonelo mortigis sian patrinon (rakonto) | Eduardo Novembro |
| 19 La muzo Talio (rakonto) | Luiza Carol |
| 20 Balt-mara skizo (poemo) | Valentin Melnikov |
| 21 Respublika Revolucia Kalendaro (historio) | Eduardo Novembro |
| 22 Universalaj Kongresoj de Esperanto (8-a – 1912) (historio) | Djalma Pessata |
| 24 Fotoraporteto: <i>Alia Moskvo</i> | Irina Mironova |

La Barko: La artikoloj enhavantaj la apudan bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon aŭ tiun de viaj lernantoj. La vortoj de la artikoloj enbarkigitaj nur estos klarigitaj, se ili ne aperos en la Reta Vortaro:

<http://www.reta-vortaro.de/revo/>

Responso: Pri ĉiu artikolo, origina aŭ tradukita, ties gramatiko, enhavo, stilo kaj vortprovizo responsas la koncerna aŭtoro.

Al blindaj homoj: Kunlaboru por plibonigi la legadon de *La Karavelo* far blindaj homoj. La LK-retejo enhavas paĝon por portugallingvaj blinduloj interesiĝantaj pri esperanto en: <http://www.lakaravelo.com/cegos.html>

Uzado de tekstoj aŭ ties tradukoj el La Karavelo: Nur post skribita permeso de la LK-direktisto, sen ŝanĝoj kaj indikante la fonton: Ekz.: «El la revuo *La Karavelo*, n-ro 9». Sendu kopion al LK.

Kunlaborantoj: La Karavelo bezonas kunlaborantojn en multaj fakoj. Se vi aprezas nian revuon kaj eldonaĵojn, skribu al LK, por kunlaborado en la LK-stabo.

Recenzeblaj libroj estu sendataj al la LK-adreso.

Ω

Kolofono

Konstantaj verkistoj...

Djalma Pessata (Brazilo)
Eduardo Novembro (Portugaliao)
Edward Jaśkiewicz (Pollando)
Francisco Wechsler (Brazilo)
Geraldo Mattos (Brazilo)
Gerrit Berveling (Nederlando)
Imre Szabó (Hungario)
Irina Mironova (Rusio)
João José Santos (Portugaliao)
Leo De Cooman (Belgio)
Luiza Carol (Israelo)
Nikolaj Neĉaev (Rusio)
Paulo Sérgio Viana (Brazilo)
Roberto Ribeiro (Brazilo)
Roger de Castro Gotardi (Brazilo)
Tibor J. Szabadi (Hungario)
Valentin Melnikov (Rusio)

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos (Portugaliao)

Revizias

Kurt Fischer (Germanio)
Luiza Carol (Israelo) - pri *La Barko*, k.a.
Roger de Castro Gotardi (Brazilo)
Túlio Flores (Brazilo)
Valentin Melnikov (Rusio)

Finaj Indeksoj

Roger de Castro Gotardi (Brazilo)

Adreso

La Karavelo
Dr. João José Santos
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal

Telefono (+351) 268 919 000

PoŝTel. (+351) 960 131 515

lakaravelo@gmail.com
www.lakaravelo.com


ISSN
1647-3353

Leĝa Depono en
"Biblioteca Nacional de Portugal"
301472/09

La Karavelo aperas
ses-foje jare en PDF
ses-foje jare en paperaj revuoj
unu-foje jare en papera volumo

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos

el la redaktejo...

**João José SANTOS**

joaojosesantos@gmail.com

Ĉu vi ŝtelus libron?


ENKONDUKO

Vi neniam ŝtelus libron. Vi neniam ŝtelus aŭtomobilon. Vi neniam ŝtelus ion ajn, escepte eble de verko. Jes, eble vi estas unu el tiuj homoj, kiuj tiel multe amas romaniston aŭ poeton, ke vi kapablas ŝteli de li lian verkon. Tio estas absurdo, sed absurdo okazanta ĉiutage. Vi legis vere ravan poemon kaj vi ekadmiris ĝian aŭtoron. Tiam vi volas alproprigi de la poemo, sciigi al aliaj, ke ĝi ekzistas, traduki ĝin esperanten aŭ en alian lingvon, kaj vi do faras tion, ne pensante, ke vi priŝtelas la homon, kiu verkis la ravan poemon, la homon kiun vi admiras kaj amas.

Kiam iu konstruas domon, vi respektas ties proprajon, kaj vi neniam ŝtelus de tiu homo lian domon. Tamen, kiam iu konstruas soneton, vi sentas, ke vi rajtas fari kion ajn pri la aliula soneto, kvazaŭ ĝi estus via, kvazaŭ la soneto estus publika, sen posedanto. Tiu pensmaniero, oni klare diru, estas barbara.

LA INTELEKTA PROPRAĴO

Ĉiuj civilizitaj landoj agnoskas, ke produktanto de artaĵo, sciencaĵo aŭ de alia elmensa produkto, havas la posedon kaj rajton al sia verko. Tio estas valida por libro, muziko, pentraĵo, fotografaĵo, desegno, elpenaĵo, ktp. Tiu rajto ne dependas de registro de patento. Tio signifas, ke se iu publikas poemon en la reto aŭ en libro, la aŭtoro havas la rajtojn pri sia verko, eĉ ne registrinta ĝin ie ajn. Li, kaj nur li, rajtas ĝin vendi, permesi publikigadon, tradukon, ktp. La patenta registro de verko ne estas necesa por doni la rajton al la aŭtoro, sed ĝi povas esti tre utila, por ke la aŭtoro sukcesu pruvi ke li la unua, ne alia, faris tiun verkon. Por pruvi tion, tre ofte sufiĉas editi la verkon en libra formato, sekvante la leĝajn postulojn validajn en la lando de la aŭtoro.



**NOVA LEI
BRASILEIRA
DE DIREITO
DE AUTOR**

ANTONIO CHAVES



**La rajto al la
intelekta
propraĵo estas
difinita en la
leĝaro de ĉiuj
civilizitaj
landoj.**

LA BONINTENCAJ ŜTELISTOJ

Kelkaj homoj, eĉ esperantistoj ;) , trovinte belan poemon en la portugala lingvo kaj admirante ĝin, tuj pensas ĝin traduki kaj publikigi en esperanto. Bonintencaj, tiuj homoj asertas, ke ili "nur volis" disvastigi la verkon de la aŭtoro amata de si, kaj ke do la aŭtoro eĉ devus ilin danki pro tia senpaga disvastigo. En la portugala, ni proverbas, ke "pri bonaj intencoj pleniĝas la infero". Nenio pli reala. Fakte ne sufiĉas, ke oni estu bonintenca por produkti agojn kun etike bona valoro.

La aŭtoro de la poemo eble malamas esperanton kaj do li ne volas miksi siajn verkojn kun esperanto. Eble la aŭtoro pensas, ke esperanto estas bela revo, sed li ne volas miksi siajn verkojn kun utopia afero kia estas esperanto. Aŭ eble li pensas alimaniere. Ne gravas. Gravus nur, ke li ne aprobis, ke lia poemo aperu en esperanto. La poemo apartenas al li, kaj do nur li rajtas permesi aŭ malpermesi la tradukon kaj eldonon de sia poemo.

Eble la aŭtoro eĉ havas intereson en la publikigado de sia poemo en esperanto, sed li ne volas donaci ĝin. Li eble deziras negoci la vendon de sia artaĵo, kio estas lia rajto.

Eble la aŭtoro eĉ volas senpage permesi la tradukon en esperanton de tiu poemo, kaj li eĉ ne kreus obstaklon al tiu sia admiranto, ke li mem traduku ĝin esperanten. Tamen, la aŭtoro rajtas kaj devas decidi pri la situacio, kaj do iu ajn traduko sen lia permeso estas kontraŭleĝa.

kaj puninda tre serioze.

La konscio, ke la aŭtoro havas la rajton al siaj intelektaj produktaĵoj estas baza kaj evidenta... al ĉiu ajn civilizita homo.

SITUACIO...

Nelge ¹ amiko mia plej bonintenca (kaj mi tion asertas sen ironio) decidis traduki poemon el La Karavelo en la portugalan kaj ĝin publikis ie. Nur poste li informis min pri la faritaĵo. Li ne petis permeson al La Karavelo por tion fari. Li ne pensis, ke eble la direktisto de La Karavelo povus esti permesinta alian esperantiston fari tiun tradukon por publikigado en alia portugallingva gazeto. Tio eĉ povus aparteni al interkonsentita protokolo inter La Karavelo kaj tiu alia gazeto. La alia gazeto povus havi la intencon publikigi la unua tiun verkon en la portugala, kaj tiel regali siajn legantojn. Tamen, mia bonintenca amiko, aginte senpripense, tradukis la poemon kaj ĝin publikis antaŭ ol tiu hipoteza fama gazeto. Certe tiu gazeto ne ŝatus la aferon kaj povus ekprocesi kontraŭ La Karavelo kaj kontraŭ la bonintenca amiko de La Karavelo, kiu tiel ŝatis la poemon, ke li eĉ ĝin iel ŝtelis.

La rakonto estas inventaĵo. Sed tia situacio povas okazi. Responsaj kaj civilizitaj homoj ne agas kontraŭleĝe, petas permeson al la rajtoposedantoj, kaj respektas la rajtojn de la aliaj homoj.

Kelkaj supren tiras la ŝultrojn fajfante pri ĉi tiuj aferoj. Tiuj devas pensi, ke eble ĉi-momente iu ŝtelisto prifajfas lian rajton al havaĵoj, kaj ĉi-momente, en kiu vi legas ĉi tiujn liniojn, la ŝtelisto estas eniranta lian domon, tra la malantaŭa fenestro. La ŝtelisto "bonintence" pensas, ke se la aliaj rajtas havi televidilon, ankaŭ lia maljuna patrino rajtas la samon... ja ŝi mem... kiu tiom laboris dum 80 jaroj, kaj eĉ ne televidon rajtas... Pripensu do kien oni portos la socion, se ĉiu supren tiros la ŝultrojn.

KIEL AGI

Post la konsciiĝo pri la absoluta neceso respekti la intelektan produktaĵon de la aŭtoro, oni vidu, kiel oni devas agi en tiaj situacioj.

1. Se vi deziras prilabori verkon (poemo, rakonto, muziko, fotografaĵo, ktp.), kies aŭtoro jam mortis antaŭ pli ol 70 jaroj, sciu ke la rajtoj

pri tiu verko jam transiĝis al la publiko. Do, iu ajn povas publikigi tiun verkon kaj ĝin traduki. Atentu, ke se via laboro incidas sur libro kiu prilaboris tiun verkon, ankaŭ tiu libro havas aŭtorojn kaj do aŭtorrajtojn. Vi povas citi el libro, sed vi ne povas editi aŭ traduki ĝin kvazaŭ ĝi estus via.

2. Se la verko, kiun vi deziras traduki ankoraŭ dependas de aŭtorrajtoj, do nepre vi devas skribi al la posedanto de la rajtoj, kiu tre ofte ne estas la aŭtoro sed la editejo ², petante permeson por tradukado kaj publikigado de la verko en esperanto. Fakte ne multaj esperantistoj faras tion, sed tio povas esti tre bona disvastiga ago por esperanto. Petante permeson al la aŭtoro, vi eble ekkonatiĝos kun la aŭtoro, vi prezentos esperanton kaj la esperanto-movadon al li, vi kaptos lian bonvolemon, kaj eble vi havigos la rajtojn de la traduko en esperanton por vi aŭ por la editejo, kiu publikos la verkon.

Ĉu tro laboriga por vi? Do, traduku el la homoj, kiuj mortis antaŭ pli ol 70 jaroj. Konsciiĝu, ke la verkoj ne apartenas al vi nur pro la fakto, ke vi aĉetis libron, vi legis la verkon kaj vi amis ĝin.

RILATE LA KARAVELON

La Karavelo ne estas publika propraĵo. Ĝi ne apartenas al asocio, sed al individua homo, kiu havas la rajtojn pri ĝi kaj pri ĝia enhavo.

Ĝenerale, LK permesas, ke oni publiku el la LK-revuoj en aliajn gazetojn, sed tiu permeso nepre devas esti laŭcele petata al la LK-direktisto. En la kolofona paĝo de La Karavelo, de antaŭ multaj monatoj, aperas la jena teksto:

"Uzado de tekstoj aŭ ties tradukoj el La Karavelo: Nur post skribita permeso de la LK-direktisto, sen ŝanĝoj kaj indikante la fonton: Ekz.: «El la revuo La Karavelo, n-ro 9». Sendu kopion al LK."

Pensu, ke eble alia homo ankaŭ volas traduki la tekston, kiun vi deziras traduki. LK permesos al la unua, kiu petis la permeson, aŭ al tiu kiu estas pli kompetenta por tiu tasko. Pensu, ke eble LK vendis la rajtojn por la portugala lingvo al iu tradukisto aŭ editejo. Pensu, ke eble la aŭtoro informis la redaktiston de LK, ke li entute ne volas ankoraŭ la tradukon de tiu poemo. Nu, pensu, homo, pensu antaŭ ol agi, ĉar vi vivas en civilizita lando, kiun vi devas honori. Ω

1 Nelge = "antaŭ ne longe", en ununura vorto.

2 Editi = eldoni librojn, diskojn aŭ simile.



el "Parolado pri la Homa Digno" ¹ **de Pico della Mirandola (1463-1494)**

Gerrit BERVELING

tradukis el la latina



Giovanni Pico della Mirandola
(1463-1494)

42:268 Sed post kiam la Hebreoj, liberigite de Ciro ² el la Babilona kaptiteco, post la rekonstruo de la templo sub Zorobabel ankaŭ ekdeziris restaŭri la Leĝon, devis Ezra, la tiama ekleziestro, post korektado de la libro de Moseo, konstati, ke sekve de ekzilo, murdoj, fuĝoj kaj kaptiteco de l' Izraela popolo, la prapatre kutimigita tradicio de nura buŝa transdonado de l' instruo ne plu povas esti retenata, kaj ke povus eĉ rezulti, ke la sekretoj de la ĉiela doktrino perdiĝus, kiujn Dio konfidis al li, kaj kies memoriĝo sen skriba notado ne longe povus plu daŭri, kaj tial li decidis kunvoki la ankoraŭ vivantajn saĝulojn, por ke ĉiu alportu kion el la misteroj de la Leĝo li ankoraŭ tenas en sia memoro, kaj alvokinte skribistojn, oni kompilis 70 volumojn (pli malpli tiom da saĝuloj estis en la sinedrion). **269** Por ke tiuafere vi ne kredu nur min, ho Patroj, vi aŭskultu kiel Ezra mem jene diras: «Kaj kiam pleniĝis la kvardek tagoj, la Plejaltulo parolis: Kion ĝis nun vi skribis, faru tion publika: legu ĝin la homoj, kiuj estas indaj je ĝi, kaj kiuj ne. Sed la sepdek laste skribitajn librojn vi konservu, por transdoni ilin al la saĝuloj inter via popolo. **270** Ĉar en ili estas fluo de kompreno, fonto de saĝeco kaj rivero de profunda scio. **271** Kaj tiel mi do faris.» **272** Jen Ezra laŭlitere. ³ **273** Tiuj do estas la libroj de la scienco *Kabalo*. En ili prave Ezra klaravoĉe rekonis la fluon de kompreno, t.e. la nedireblan teologion de ne-materia Dio, la fonton de saĝeco, t.e. la perfektan metafizikon de intelektaj kaj anĝelaj formoj, kaj la riveron de profunda scio, t.e. la fundamentitan filozofion pri la naturaj fenomenoj.

43:274 Tiujn ĉi librojn Papo Siksto la 4-a ⁴, la antaŭulo de Inocento la 8-a ⁵, sub kiu vi vivas feliĉe, per pleja zorgo kaj atento igis eldoni Latine je ĝenerala utilo al nia fido. **275** Ĉe lia morto tri el ili jam estis alireblaj por Latine parolantoj. **276** Tiuj ĉi libroj nuntempe ĉe la Hebreoj estas tiel alte taksataj, ke neniuj rajtas tuŝi ilin, kiu ankoraŭ ne estas 40-jara. **277** Kiam ĉi tiujn librojn kontraŭ ne modesta prezo mi estis akirinta kaj poste plej atente per nelacigebla klopodado mi estis trastudinta ilin, mi trovis en ili (Dio estas mia atestanto) ne tiom la Mozean religion, kiom la Kristanan. **278** Tie <estas> la mistero de la Triunuo, tie la enkarniĝo de la Parolo, tie la Dieco de la Mesio. Tie pri la hereda peko, pri ĝia elaketo fare de Kristo, pri la ĉiela Jerusalemo, pri la falo de la demonoj, pri la rangoj de la anĝeloj, pri purgatorio, pri la punoj de la infero, la

¹ Post kiam en La Karavelo n-ro 6, mi aperigis la komencon de tiu ĉi ege fama teksto, kiu iasence povas roli kiel principdeklaro de la Renesanco, jen do ĝia fino. La traduko estas preta kaj baldaŭ aperos ĉe VoKo. (GB)

² Ciro la Granda (559-529) permesis en 538/7 ke la Hebreoj povu reiri por rekonstrui la templon de Jerusalemo. Tiun ĉi edikton konfirmis reĝo Dario la 1-a (521-485). (GB)

³ 4 Ezr 14,45-47. Kompleta traduko aperis ĉe VoKo. (GB)

⁴ Siksto la 4-a, papo 1471-1484, grava mecenato de sciencoj kaj artoj, konata i.a. pro la fama *Siksta Kapelo* en Vatikano. Li multe prosperigis la Vatikanan bibliotekon. (GB)

⁵ Papo 1484-1492; malpermesis la de Pico della Mirandola por 1486 planitan diskutadon pri ties 900 tezoj. (GB)

samon mi legis kiel ĉiutage ni legas ĉe Paŭlo kaj Dionizio, ĉe Hieronimo kaj Aŭgusteno. 279 Sed kiom koncernas la filozofion, oni kredus aŭskulti Pitagoron kaj Platonon, kies doktrinoj estas tiel parencaj al la kristana fido, ke nia Aŭgusteno profunde dankas Dion⁶, ĉar la verkoj de l' Platonanoj atingis liajn manojn.

44:280 Entute apenaŭ estas problemeto inter ni kaj la Hebreoj, kiu ne estus tiel klare refutebla el la libroj de la Kabalistoj, ke neniu anguleto plu restus kie ili sin kaŝu. 281 Pri tio mia plej grava atestanto estas Antonio Kroniko, tre klera viro, kiu propraorele, dum mi gastis ĉe li, aŭdis kiel la Hebreo Daktilo, tre klera en tiu ĉi scienco, senhezite aliĝis al la opinio de la Kristanoj pri la Triunuo.

45:282 Sed por reiri al la preparolo de la ĉefpartoj de mia diskutado: mi antaŭmetis ankaŭ miajn sentencojn pri la interpretoj de la poemoj de Orfeo⁷ kaj Zoroastro. 283 Ĉe la Grekoj Orfeo estas legebla preskaŭ senmanke, Zoroastro nur lakunoze⁸ ĉe ili, pli komplete tamen ĉe la Ĥaldeoj. Ambaŭ konsideriĝas kiel patroj kaj aŭtoroj de praa saĝeco. 284 Ĉar por nun preteri Zoroastron, kiu ĉe la Platonanoj ne malofte kaj ĉiam kun alta estimo menciigis, la Ĥalkisano Jambliono⁹ skribas, ke Pitagoro konsideris la Orfean teologion kiel ekzemplon, laŭ kiu li mem formu sian propran filozofion.

285 Oni ja eĉ asertas, ke la diroj de Pitagoro estas konsiderataj sanktaj, ĉar ili fluis el la doktrino de Orfeo; de tie, kvazaŭ el ĝia prafonto, fluis la sekreta doktrino pri la nombroj kaj ĉio, kion la Greka filozofio havas kiel grandan kaj noblan. 286 Sed (konforme al la kutimo de la malnovaj teologoj) Orfeo tiom envolvis la misterojn de siaj tezoj per vualoj de mitoj kaj poezia kovraĵo, ke kiu legas liajn himnojn, povus kredi, ke sub ĝi kaŝiĝas nenio krom plej simplaj fabeloj kaj malseriozaĵoj. 287 Tion mi volis diri, por ke oni vidu, kia estis mia tasko, kaj miaj problemoj, por eltrovi la sekretan filozofian sencon el ĉi artefarita enigmo-plektaĵo, el ĉi obskuraj rakontoj, precipe ĉar ĉe tiu ĉi grava kaj komplika materio, mi ne povis apogiĝi sur subtena esplorado de aliaj interpretantoj. 288 Kaj tamen albojis min la hundoj, ke iun ajn senvaloran kaj leĝeran fatrason mi akumulis, nur por paradi per la nombro de la tezoj, kvazaŭ ne ĉio ĉi estus nesolvitaj kaj plej dubindaj temoj, pri kiuj la ĉefaj akademioj dueladas, kvazaŭ mi mem ne multon alportus, kion eĉ tiuj ĝis nun ne konis nek ekstraktis, kiuj kritikas min kaj sin kredas ĉef-filozofoj.

46:289 Ja lontane mi estas de tio, kion ili kulpigas al mi: male, mi klopodegis limigi la diskutadon je kiel eble malplej da punktoj. 290 Se (kiel aliaj kutimas fari) mi ŝatus dismembrigi ilin en subtemoj, certe tio krevintus en sennombran amason. 291 Por mencii nur unu ekzemplon: Kiu ne scias, ke unu el la 900 tezoj – nome tiun pri la akordiĝo inter Platona kaj Aristote-la filozofio – mi povus disigi en 600, ja eĉ pli da tezoj, sen ajna suspekto pri artefarita multnombrecio, – nome se ĉiujn lokojn mi elnombrus, kie la aliaj vidas neakordiĝon, dum mi opinias ilin tie akordigeblaj? 292 Sed tamen mi eldiru – estas ne modesta eldiro, kiun mi faras nur kontraŭvole –, ĉar la ĵaluzuloj, la kontraŭuloj min devigas diri ĉi tion: Mi intencis en tiu ĉi de mi planita kunveno pruvi, ne ke tiel multe mi scias, sed ke mi scias, kion multaj ne scias.

47:293 Sed nun, plej alte estimindaj Patroj! Nun parolu la faktoj mem! Mia parolado ne plu retenu vian deziron, plej eminentaj doktoroj, kiujn armitaj kaj grandentuziasme batalpretaj mi vidas. Do sub feliĉaj aŭguroj, dum sonas la trumpeto: ni ekataku! Ω

⁶ *Konfesaĵoj* 7:9 (GB)

⁷ La poemoj kiujn ni havas sub aŭtorindiko de Orfeo, efektive datiĝas parte – la fragmentoj de *Argonaŭtika* (pri la partoprenado de Orfeo en la ekspedicio) – el Romia Epoko (4-a/5-a jc), parte – la kolektaĵo de la *Himnoj* – el la 2-a jc p.Kr. (GB)

⁸ Lakuno estas truo en manuskripto. (GB)

⁹ *Vivo de Pitagoro* 28:145. (GB)

Florbelo Espanko
(1894 - 1930)
alenteĝa pasiema sonetistino



Neide BARROS RÊGO
verkis la soneton en la
portugala

João José SANTOS
tradukis

Kial, Florbelo?

Florbelo, kial vivon vi forlasis
en trista kaj soleca ĉambro nigra?
Kaj kial vi decidis la vehoron
je via datreveno la naskiĝa?

Se vi eltenus, ino ĉagrenita,
vi farus el sonetoj kuracilon.
Kaj eble laborante viajn versojn,
forĝesus vi la penson pereigan.

Sed kiel eblus iel vin akuzi?
En vi, Florbela, la amo tiel fortis,
profundis tiom ŝire la angoro!...

Kristalis viaj versoj tiom verve,
ke post amara vivo sur la Tero,
furoras via nomo post la morto.



Florbelo Espanko

João José SANTOS
biografiis

Ŝi estas eble la plej elstara sonetistino en la portugala lingvo. Pasia kaj klera, sendependa kaj decidema, Florbela estis alenteĝanino, kies menso kaj teniĝoj pli similis al la modernaj portugalinaj ol al tiuj ŝiatempaj. Ŝiaj sonetoj estas, laŭforme kaj enhave, perfekte petrarkaj. En ili, ŝiaj sentoj de amo kaj ĉagreno, memamo kaj pasio, feliĉo kaj elreviĝo, burĝonas kun origineco kaj ravanta lirika kapablo.

Florbela naskiĝis en la belega alenteĝa urbeto Vilaviso (proksime de Estremozo) en 1894, kaj sin mortigis en la tago de sia naskiĝdatreveno, la 8-an de februaro 1930, en la norda urbo Matozinjo.



Biblioteko Florbelo Espanko, en la norda portugalia urbo Matozinjo.

Esti Poeto

Florbela ESPANKO
verkis la soneton en la portugala

João José SANTOS
tradukis la poemon en esperanton

La poeto pli altas kaj pli grandas
ol la homoj! Li mordas kvazaŭ kisas!
Almozul' li donacas kvazaŭ estus
Reĝo de l' Cisa kaj Transa Doloro!

Li brilegas pro miloj da deziroj,
kaj li ne scias eĉ, ke li deziras!
En li flagradas astro ĉi-interne.
En poet' estas krifoj de kondoro!

Li malsatas, soifas l' Infiniton!
Lia ŝild' estas or-silkaj matenoj...
En solan krion li metas la mondon!

Poet' estas ĉi am' al vi fatala...
kaj, en mi, via sang', anim' kaj vivo,
kaj kantadi ĉi-tion al la homoj! ¹


Ω



www.lakaravelo.com

¹ La poemio "Ser poeta" (portugale) estas unu el la plej konataj kaj aprezataj el la alenteĝa poetino, kaj ĝi estas kantata de muzikgrupoj. Ĝi estas perfekta soneto, kiel ĉiuj el la poemoj de Florbela. En la traduko, kiel kutime, oni respektis ĉiujn elementojn de la soneto escepte de la rimo.





Neide BARROS RÊGO



La verkistino de la soneto *Kial, Florbela?* estas vaste konata en esperantio. Ŝi naskiĝis en Brazilo, en la subŝtato Minas, en 1938.

En 1951 la familio transloĝiĝis al la subŝtato Rio, kie ŝi diplomiĝis instruistino kaj faris kelkajn kursojn pri administrado.

En 1958, per konkurso, ŝi fariĝis oficistino de la Ŝtata Deputitejo kaj emeritiĝis en 1989.

Diplomita pri deklamado en 1964, ŝi tamen jam instruis ĝin ekde 1961 en la kultura centro, kiun ŝi instalas en sia domo, kaj en kiu ŝi okazigas oftajn kulturajn eventojn.

Portugallingve ŝi ellaboris poezian antologion en 1994, verkis sian unuan poemlibron en 2004 kaj nun ŝi apartenas al diversaj akademioj.

Esperanton ŝi eklernis en 1991, sed jam ekde 1965 ŝi estis invitita deklami en Esperanto, pro siaj rimarkinde belaj interpretado kaj elparolo. Ŝi deklamis en la mond-kongresoj de UEA en Vieno (1992), Montpeliero (1998) kaj Fortalezo (2002).

Ekde 2001, ŝi ricevis plurajn premiojn pro siaj originalaj poemoj, interalie de UEA (2005 kaj 2006). Ankaŭ premiitaj estis ŝia vidbendo "Neide Deklamas" (1998) kaj tiu de Sylla Chaves "Plurspecaj Eroj" (2002), en kiu ŝi kantas kaj deklamas. Ŝi multe tradukas poezie kaj proze kaj ankaŭ komponis muzikon por la poemo "Ho, mia kor", de Zamenhof, kiun ŝi jam kantis kaj registris en KD kaj en la DVD "Neide kantas".

La apogon de sia edzo Walmir ŝi taksas gravega. Kun li, ŝi ricevis hejme plurajn eksterlandajn esperantistojn, el kiuj plej elstaris la nepo de Zamenhof, kiu tagmanĝis kun ili akompanate de 30 aliaj gravaj brazilaj geesperantistoj.

Nuntempe tiu geedza paro konstante apogas la Esperanto-movadon en Rio.

Kune kun Sylla Chaves, ŝi redaktis la antologion "Brazila Esperanta Parnaso".

Aŭskultu ŝiajn kantojn kaj deklamadojn serĉante en Jutubo. (NBR - JJS)

www.lakaravelo.com



Geraldo MATTOS
www.gmverda.com.br

Deomortigo

unuakta tragedio

Personoj

Deino: diino de la *Fundamento de Esperanto*

Deo: infano kaj edzo de Deino

Arba: tradukanto el la gedea lingvo.

DEINO: Mi pensas en la cerbon de Arba, kiu tradukas, kaj lian tradukon mi sonigas. Mi estas Deino, kiu estas sola en la Tempo kaj sola en la Spaco. kaj ĝuste tial mi estas tute sentempa kaj senloka, ĉar mi ne povas iri tien kaj alien, ĉar tie kaj alie mi jam estas...

[Al li] Arba! Vi kontraŭas la *Fundamenton de Esperanto*, ĉar mi mem kreis tiun lingvon kaj iam mi ĝin sufloris al Zamĉjo, mia unua kaj sola profeto. Mi tamen ne povas pardoni lin, ke li ŝanĝis mian nomon al Diino, tre missona, sed mi forgesigis lin kaj li inkludis mian nomon en la *Fundamento*: Deino! Rebonigu nun vian tekston: [*Li eniras*]

ARBA: ... iri tien kaj aliloken, ĉar tie kaj aliloke mi jam estas... Verkanto tamen rajtas...

DEINO: Kaj mi estas jam laca kaj tedita de tio, ke mi estas ĉiama kaj ĉiea, sed sola!...

Mi kreos kunulon por mi, ĉar mi estas la sola en la Tempo kaj la sola en la Spaco. kaj ĝuste pro tio mi estas tute sentempa kaj senloka. Li tamen aperas post mi kaj do estas malpli granda ol mi: lia nomo estos do malpli longa ol la mia... Li vere estas nur duoneterna, dum mi estas unuoneterna. Mi do diru, vorte kaj perforte de la realeco:

- Estu Deo! [En tiu momento Deo eniras.]

ARBA: Kaj Deo tuj ekestas, kaj ŝi vidas lin, ke li estas bona! Kaj li turnas sin al ŝi:

DEO: Dankon, Deino!, ke vi kreis min! Kio mi estas via?

DEINO: Kreito kaj edzo. Ni estas du personoj en unu sola deeco, kaj tial ĉio estas

nun, kia ĉio estis antaŭe, kaj ĉio estos poste, kia ĉio estas nun. Mi faros ion novan: la nuna kreito estos farata por la tempo kaj por la spaco: mi inventis la vivon! Mi do diris:

- En deina paradizo kun plantoj sur la grundo, kaj bestoj sub la grundo kaj sur la grundo kaj tra la ĉielo, estu virino, simila al mi, kreanta kaj akuŝanta! Eva, mi estas via patrino!

DEO: Ĉu vi konsentas tian povon al mi, kiun vi kreis kaj akuŝis?!

DEINO: Laŭ via plaĉo! Nun estas via vico.

DEO: Dankon, kara edzino! Mi do diru, vorte kaj perforte de la realeco:

- Vi viro, simila al mi, kiu estas forta kaj pova! Adamo, mi estas via patro!

ARBA: Kaj dume la tempo spacis kaj la spaco tempis, kaj Deino restas plej ofte en sia hejmo, dum Deo vojaĝas plej ofte en sia mondo. Sufiĉis tamen malpli ol unu el iliaj sekundoj por ilia konstato, ke nur la vivodono de Deo estas katastrofa kaj mortiga, kaj tute ne tiu de Deino! Eva kaj Adamo havis du virajn infanojn, kaj nur poste virinajn: Kain estis la unua naskiĝinto, kaj Habel la dua... Kaj la unua mortigis la duan!... Tiu mortigo malfermis larĝan pordon por ĉiuj aliaj individuaj kaj kolektivaj krimoj: la plej kruela estas la milito... Krimo estas invento de viro, kies fantazio kreis la amazonojn!...

DEINO: Mi tro fidis Deon, kaj mi nun komparas mian virinon kaj lian viron. Kaj ĉagrenita mi konstatis la grandan tragedion: Mia virino kapablas naski dum malpli ol duono de sia vivo, dum viro kapablas naskigi eĉ unu tagon antaŭ sia maljuna morto... Ho Arba! Ĉu vi ne naskigis al vi infanon, kiam vi estis 75-jara viro?

ARBA: Mi ne respondas, ĉar vi jam antaŭe sciiĝas pri mia respondo.

DEINO: Ju pli mi plu pensas, des pli mi koleras: Virino naskas per doloraj skuoj, dum viro naskigas per fervoraj ĝuoj... En tre malmultaj triboj Eva estas la estrino, sed en plej multaj nur sklavino... Mi ne plu toleros tion. Sola avantaĝo: ili vivas pli longe ol la viroj, ĉar mi estas pli aĝa ol Deo... Tia avantaĝo estas tamen malavantaĝo: ju pli da longa vivo, des pli da turmenta aktivo... Mi do diru:

- Malestu Deo...

ARBA: Kaj Deino restas por ĉiam sola...

Ω

**Nikolaj NEČAEV****La redaktisto de La Karavelo**

Vi hisas velon
 Por maren lasi
 La Karavelon,
 Por gloron ĉasi.

Tra maroj prozaj
 Kaj poeziaj,
 Tre seriozaj
 Kaj fantaziaj

La ŝipo kuras
 Al legemuloj.
 Vi aventuras
 En mond-anguloj.

Bela nokto

Per nigro nokto alton gudras,
 Per neĝo nokto sojlon pudras.
 Sub steloj ŝipon versen rudras,
 Mi rudras versen Karavelon,
 Por lego via kreas belon.

Karavelo en nova jaro

Johano ree hisas velon
 Por gvidi nian karavelon.
 La ŝipon gvidas li al belo:
 Al vers', eseo kaj novelo.
 La kor' kun ĝoja antcipio
 Jam sentas belon de la ŝipo.
 En nova jar', en nova vivo
 Pli klaru l' ŝipa perspektivo.



Edward JAŚKIEWICZ

tradukis el la pola

Interparolo de ebriulo kun luno

Włodzimierz ZAGÓRSKI

Por kia cel' ekzistas vi?,
 dum nokt' al luno diris
 hejmen iranta ebriul',
 (eĉ lun' pro tio miris).
 Post ter-patrino kuras vi
 tenante jupon ŝian.
 Vin kondukante - havas ŝi
 perturbon rotacian!
 Per sun-eklips' angoras nin
 kaj teron... vi senlime,
 skuante eĉ per ŝia sin'
 senhonte, sen-estime;
 Ciklonojn, plagojn en sekret'
 vi ĉiam al ŝi donas,
 al vi hund' hurlas - kaj poet'
 versaĵojn ja komponas!
 Mortpale ŝin lumigas vi
 vaganta en ĉielo.
 Per prunteprenita radi'
 kontraŭe al la stelo.
 Buŝaĉon kun arĝent-makul'
 kovritan per pustuloj
 - vi havas - stulta ebriul'
 drinkanta nur nebulojn!
 En sekvantar' de steloj, vi
 tendar-servisto estas.
 Per prunteprenita radi'
 por mi vi ne majestas.
 Ŝajnigas teron trompitol',
 sed multaj pesimistas,
 ke unu eĉ sur via bul'
 drinkejo ne ekzistas!
 Por kio do vin kreis Di'?
 ...arĝenta mallertulo!

Por mi ja ne utilas vi
 kaj restas kvazaŭ nulo!
 Jen ekster la nuba embusk'
 grumblulon lun' priridas:
 Ja ebriulojn dum krepusk'
 mi hejmen ĉiam gvidas!

Ω

Kiel Leonelo mortigis sian patrinon

Eduardo NOVEMBRO

Leonelo stumblis kaj laŭtprotestis kontraŭ la malbone pavimita trotuaro, ne kontraŭ siaj jam ŝanceliĝantaj kruroj:

“Ĉi tiuj elstarantaj ŝtonoj! Fuŝa laboro! Oni ne plu scias fari la faman laŭ-portugalan pavimadon”.

Ne plu estis nur penso, sed jam grumblado, daŭrigota grumblado de ebrulo:

“En Parizo mi neniam stumblis sur la trotuaroj, kiel tiom ofte okazas en ĉi tiu urbo... He!... Tie... En Parizo... Ĉit!... Ho Portugalio!, malprogresinta lando. Oni ne plu progresos. Malprogresinta lando. Iu preterpasanto povas fali kaj vundiĝi. Kiu pagos pro tio? Neniu! Poste neniu kulpos! Krome jam estas malhele, kaj ne eblas bone vidi; des pli ke miaj dikaj okulvitroj ankaŭ senbriliĝis. Oni ne plu scias fari ion ajn. Oni ne plu scias fari ion ajn... Kanajlaro... Malprogresinta lando! Oni ne plu progresos...”

Lia vinvoĉa tono iom post iom plilaŭtiĝas laŭ liaj stumbloj kaj ŝancelirado:

“Stultuloj... stultuloj...”

Preterpasantoj lin rigardas suspekteme kaj malproksimiĝas por eviti kunfrapiĝon. Unu plia drinkemulo tra la urbo, ĉe noktiĝo. Kutimas... Nenio zorginda, nek zorgenda! Jam tempas rehejmiĝa ripozo. Ĝis la morgaŭo...

Ĉe pordo de tre dekliva strato li elpoŝigas ŝlosilojn, kiuj sonore tintas en liaj manoj.

Li grumbladas senĉese suprenirante la apikan ŝtuparon per stumbloj, ne per paŝoj. Ĉe lia etaĝo la malfacilaĵoj pligrandiĝas. Enŝovado de la ŝlosilo en la seruron iĝis problemo.

“Vera merdaĵo ĉi tiuj ŝlosiloj; neniam ili bone funkcias, ĉiam problemo... Ankaŭ la seruro jam estas difektita. Fekaĵo, ĉio fekaĵo. Fekaĵo la tuta vivo, ankaŭ mi jam estas fekaĵo!...



Pli ol la enŝlosilado mem, lin ĝenas tio, kion li devos alfronti tie ene: la kutimajn riproĉojn de sia maljuna patrino...

Sukcesinte, post pluraj streboj, bone enmeti la ŝlosilon, li kiel eble plej senbrue puŝas la pordon, sed ĝi grincas kaj nekonvene denuncas lian eniradon. Tuj el ena ĉambro aŭdiĝas laŭte la patrino voĉo:

— Ĉu estas vi, Leonelo?!...

— Ne! Estas mia fantomo!

— Kiel kutime, vi ne venas sola. La vino ĉiam kun vi! Ebrulo!...

— Lasu min! Ne ĝenaĉu min! Lasu min trankvila. Mi laciĝas pro laboro, kaj mi bezonas dormi trankvile. Ne ĝenaĉu min! Vi dormu mem, kaj lasu min ripozi.

— Kiam vi gajnos prudenton? Kiam vi iĝos saĝa? Se via patro ne estus mortinta tiom frue, li estus edukinta vin konvene per pezaj manfrapadoj, kiujn vi ankoraŭ bone meritas. Ebrulo! Tiu profesio via kulpas... Profesio de ebruloj!

— Ho, sinjorino! Lasu min dormi!... Mi jam ne povas aŭdi vin! Ĉiam la sama paroladaĉo! Enuiga paroladaĉo! Mi ne plu eltenas vin! Kial vi ne mortas kaj lasas min vivi miaplaĉe?

— Ebrulo kaj malbonedukito! Ĉu tio estas deca maniero paroli al via patrino? Kiam mi mortos vi iĝos ankoraŭ pli mizera...

— Mi ne plu povas aŭdi vin! Silentu tuj! Ĉit! — kaj li tondre forpuŝis la pordon, kune kun kriego:

— Iutage mi mortigos ĉi tiun kadukulinaĉon!

Pro la samtempa brua pordfermo, lian lastan diron ŝi ne aŭdis.

Post kelkaj tagoj, en la tipografio kie laboris Leonelo, la kolegoj prikomentis:

— Kio okazis al Leonelo? Li venas funebre vestita.

— Lasu lin alproksimiĝi... Li tuj klarigos, certe...

La mieno de Leonelo estis fakte funebraspekta. La dikaj lensoj de liaj okulvitroj estis ankoraŭ pli malpuraj ol kutime. Sed li, preskaŭ ne rigardante al la scivolemaj kolegoj, aliras al la kabineto de la estro, kaj tie restas ne longtempe. Fakte li eliras kune kun la ĉefo kelkajn minutojn poste, nenion dirante.

La estro mem, kiu rondiras tra la metiejo kaj parolas laŭvice al ĉiuj laborantoj, informas pri la ĵusa forpaso de la patrino de Leonelo. Samtempe li petas kontribuojn por ŝia sepultado, ĉar, kiel oni scias, la ĉiam senmona Leonelo tute ne povas pagi. Sur la paperfolio oni enskribas kiom ĉiu sin pretigas donaci por helpi al la kolego en tia bedaŭrinda situacio. Solidareco nerifuzeble tuj estiĝas inter la proletoj.

Post kalkulo de la kolektita monhelpo, la ĉefo elkasigas monbiletojn, kaj ilin transdonas al Leonelo. Ĉi tiu senprokraste foriras kun ripetitaj raŭkvoĉaj dankoj al ĉiuj kolegoj pro ilia solidareco.

Ĉar unu semajno post la funebrantaj tagoj leĝe rajtigataj, Leonelo ankoraŭ ne estis repreninta la deĵoron, la mastro iom maltrankviliĝis. Timante ke io grava povintus okazi al la subulo, li decidis sendi la laborejan serviston ĉe Leonelon por sciigi pri li.

Ne konante la kvartalon, la servisto ne facile trovis la loĝejon de la kolego, ne facile supreniris kaj la deklivan straton, kaj la apikan malluman ŝtuparon. Post blindpaldado, li sukcesis malkovri tion, kio al li ŝajnis pordo, kaj per la fingronodoj li frapis.

Unue li aŭdis rampantajn piedojn, kaj finfine maljunulino malfermis la pordon demandante:

— Kion vi deziras, sinjoro?

— Ĉu ĉi tie loĝas sinjoro Leonelo?

**ĈI TIU SPACO KOSTAS
200 EŬROJN JARE.
ĜI APEROS EN ĈIUJ VERSIOJ DE
LA KARAVELO.
ĜI ESTOS VIDATA DE HOMOJ
EL MULTAJ LANDOJ.**



— Jes ja, sed je ĉi tiu horo li ne ĉeestas...

— Ĉu?

— Mia filo jam eliris matene al la laborejo, kiel kutime... — kaj post paŭzo pro la surpriziĝinta mieno de la vizitanto: — ... Lastatempe li rehejmiĝas ĉiufoje pli malfrue kaj pli ebria, li nur dormas, kaj tuj foriras... Kromhorojn, li sin pravigas... Mi tute ne komprenas... Ju pli da mono li havigas, des pli li disipas en drinkado... Kio okazos al mia Leonelo, tiu malfeliĉulo, kiam mi mortos?...

Ω



Luiza CAROL




La muzo Talio

Iam vivis naŭ fratinoj, kiuj estis feinoj kaj nomiĝis "la naŭ muzoj". Ili loĝis kune kun la ĉevalo Pegazo en arbara monto.

Pegazo estis sorĉita ĉevalo. Ĝi estis blanka kiel lakto, ĝi havis blanksilkan kolhararon, blanksilkan voston kaj bluajn mildajn okulojn. Pegazo estis tiom malpeza kiel vaporo kaj ĝi havis blankajn flugilojn, pli grandajn ol tiuj de aglo.

La muzoj estis nevideblaj per homaj okuloj, kaj ankaŭ ilia ĉevalo estis nevidebla - apenaŭ oni sentis brizeton el la flirteto de ĝiaj flugiloj.



La muzoj Klio, Eŭterpo kaj Talio
far Eustache Le Sueur

La plej maljuna el la muzoj estis LA MUZO DE LA HISTORIO, kiu helpadis homojn priskribi realajn okazaĵojn. Ŝi mem skribadis ĉiutage en sian kajeron, per malviŝebla inko, pri kio okazis en la mondo. Unu el la muzoj estis LA MUZO DE LA STELOJ, kiu instruis la homojn pri la stelmovado en la ĉielo. LA MUZO DE LA MUZIKO estis la feino kiu helpis homojn muziki. LA MUZO DE LA DANCO instruis homojn danci. Tri ĝemelaj fratinoj estis LA MUZOJ DE LA POEZIO, kiuj helpis homojn skribi poemojn, parkeri kaj bele deklami ilin. Unu muzo estis LA MUZO DE MALGAJAJ TEATRAĴOJ kaj alia muzo, la plej juna el ĉiuj, estis LA MUZO DE GAJAJ TEATRAĴOJ. Ties ĉi nomo estis Talio.

Okazis iam akra milito, pro kiu multaj homoj perdis sian vivon. Multa malamo kolektiĝis tiam en la homaj animoj, kaj multaj infanoj iĝis orfaj, kiel okazas post ĉiu ajn milito. La muzoj estis ege okupataj pri la kuraĝigo kaj helpado al la suferantoj. Pri gajaj teatraĵoj neniu plu zorgis. La muzon Talio neniu plu vokis, kaj la homoj forgesis ŝin. Eĉ ŝiaj fratinoj ne havis sufiĉan tempon por pensi pri ŝi.

La sola kiu ne forgesis la muzon Talio estis la Patrino De La Muzoj, maljuna feino loĝanta en groto. Tiu estis la feino de la memoro kaj forgeso. Tiu tiam iris al Muzo Talio kaj konsilis ŝin kion fari.

Do, ianokte, Muzo Talio kolektis amason da orfaj infanoj, enirigis ilin en ŝipon kaj gvidis ilin en insulon. Ŝi elektis nur etajn infanojn, ankoraŭ nevizitintajn lernejon. Neniu rimarkis tiam la malaperon de la infanoj, ĉar la Patrino De La Muzoj igis ĉiujn homojn forgesi ilin.

La Patrino De La Muzoj viŝis el la cerbo de la orfaj infanoj la memoraĵojn pri la milito. Ŝi viŝis ĉiujn malbenojn kaj ĉiujn malamajn vortojn, kiujn la infanoj aŭdis ĝis tiam. La Patrino De la Muzoj ĉirkaŭigis la Insulon de la Infanoj per nuba kurteno, por ke neniu ŝipo albridiĝu tie.

Tiel Talio restis en la Insulo de la Infanoj por ludi kaj prepari kune gajajn teatraĵojn. Ĉiu tago el la vivo de tiuj infanoj fariĝis fakte gaja teatraĵo, ĉar Muzo Talio zorgadis, ke nenio malgaja okazu en la insulo.

Pasis la tempo. La faligitaj domoj estis rekonstruitaj kaj la homoj denove vokis la feinon Talio, LA MUZON DE LA GAJAJ TEATRAĴOJ. Ĝiaj fratinoj serĉis ŝin kaj finfine la blankflugila Pegazo malkovris la vojon al la Insulo de la Infanoj. Tiam, ĉiuj fratinoj de Talio venis al ŝi. Kiam LA MUZO DE LA MUZIKO metis sian piedon sur la insulo, la infanoj ekaŭdis nostalgian kanton kaj en iliaj koroj ekbrulis la nostalgio pri ilia hejmlando. Ĉiuj revenis hejmen kaj la homoj multe ĝojis, kiam la Muza Talio denove ekloĝis inter ili.

La vivo de homoj kaj muzoj fariĝis multe pli agrabla danke al la ĉeesto de Talio. Eĉ la danĝero pri milito fariĝis iom malpli granda, kiam bonhumoraj homoj ridis kune, spektante gajajn spektaklojn. La aliaj muzoj ne volis, ke ilia fratino kaŝu sin denove en la Insulo de la Infanoj, ĉar ili amis ŝin kaj deziris ke ŝi restu kun ili. Tiel, la Patrino De La Muzoj viŝis el ĉies cerbojn tiun tutan okazaĵon, por ke neniu plu revenu sur la insulon. LA MUZO DE LA HISTORIO ŝiris el sia kajero la folion, sur kiun ŝi estis skribinta tiun ĉi rakonton. Ŝi ĉifonis la folion kaj forĵetis ĝin en la maron.

Sed neniam viŝiĝas la inko per kiu LA MUZO DE LA HISTORIO skribas. Tie, en la profundegaĵo de la maro, tiu ĉi rakonto estis iam trovita de fiŝo, kiu legis ĝin kaj poste englutis la folion sur kiu ĝi estis skribita. La fiŝo rakontis la tutan okazaĵon al testudo. La testudo eliris sur la plaĝon kaj rakontis ĉion al kolombo. Poste, la testudo tuj eniris la maron kaj neniam reaperis. La kolombo atingis la sojlon de mia fenestro kaj rakontis al mi ĉion: "gu-gu-gu... gu-gu-gu...".

Pri la naŭ muzoj, multe da grekaj kaj romiaj rakontoj parolas. Sed pri la okazaĵo de tiu ĉi rakonto, vi trovos nenian spuron en alia loko. Kial? Ĉar nur al mi la kolombo rakontis ĝin. Kial nur al mi? Tio estas sekreto, kiun mi ne volas malkaŝi al vi nun. Ω



Valentin MELNIKOV

Balt-mara skizo
(laŭ sperto de Andrej Ĥadanoviĉ)

**En maro naĝas knab'. Sur plaĝo
Publikon trafas vera ŝok':
Ĉu li frenezas? Kia naĝo
Ĉe la temperatur' +8?**

**Li vikle kraŭlas preter bordo,
Kaj al publika interes'
Replikas: "Ĉio `stas en ordo!
Hieraŭ estis ja +6!"**

Ω

Respublika Revolucia Kalendaro

Eduardo NOVEMBRO

**Estigita de la franca Nacia Konvencio
la 24-an de oktobro 1793**

La kreinto de ĉi-tiuj monatonomoj estis **Philippe FABRE D'ÉGLANTINE**. Li estis poeto, aktoro, politikisto, kaj li estis gilotinata kune kun la partianoj de Danton.

La jaro komenciĝas sur la ekvinokso de aŭtuno, kaj ĝi estas dividita en 12 monatojn, ĉiu kun 30 tagoj, plus 5 aŭ 6 komplementaj tagoj. La monatoj estas dividitaj en tri tagdekojn, kiujn oni nomis jene: *primidi*, *duodi*, *tridi*, *quartidi*, *quintidi*, *sextidi*, *septidi*, *octidi*, *nonidi*, *decadi*.^{1 2}



La metra sistemo aplikata al la tempomezuro
(far la respublikistoj)

- 1 Eble, en esperanto, oni povus nomi ilin: unuatego, duatego, ktp. (JJS)
- 2 La metra sistemo kaj la kilogramoj estis kreaĵoj en tiu historia momento, plena je racieco kaj konstruiveco. Iam la homoj agnoskos, ke la Internacia Lingvo Esperanto enkadriĝas en la plej bonaj proponoj faciligi la vivon de la homoj. (JJS)

AŬTUNO

1-a monato: VENDEMIARO
de la 21-a/22-a de septembro
ĝis la 21-a/22-a de oktobro

2-a monato: BRUMERO
de la 22-a de oktobro
ĝis la 21-a/22-a de novembro

3-a monato: FRIMERO
de la 21-a/22-a/23-a de novembro
ĝis la 20-a de decembro

VINTRO

4-a monato: NIVOZO
de la 21-a/22-a/23-a de decembro
ĝis la 19-a/20-a/21-a januaro

5-a monato: PLUVIOZO
de la 20-a/21-a/22-a de januaro
ĝis la 19-a/20-a/21-a de februaro

6-a monato: VENTOZO
de la 19-a de februaro
ĝis la 20-a de marto

PRINTEMPO

7-a monato: ĜERMINALO
de la 21-a/22-a de marto
ĝis la 18-a/19-a de aprilo

8-a monato: FLOREALO
de la 20-a/21-a de aprilo
ĝis la 29-a de majo

9-a monato: PRERIALO
de la 20-a de majo
ĝis la 28-a de junio

SOMERO

10-a monato: MESIDORO
de la 20-a de junio
ĝis la 19-a de julio

11-a monato: TERMIDORO
de la 20-a julio
ĝis la 18-a aŭgusto

12-a monato: FRUKTIDORO
de la 18/19-a aŭgusto
ĝis la 16-a septembro



Djalma PESSATA



UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1912

8-a Universala Kongreso de Esperanto



esperantistaro en Krakovo

Loko: Krakovo, Pollando

Dato: 11-a ĝis 18-a de aŭgusto 1912

Aliĝintoj: 1000 homoj

Tiu ĉi Jubilea Kongreso (en 1912 oni festis la 25 jarojn de Esperanto) bedaŭrinde ne povis okazi en Varsovio, tiam en Rusujo. La evento okazis en pli libera parto de la malnova Pollando, Krakovo, en Aŭstrio-Hungario.

Zamenhof diris...

En sia parolado de la 8-a UK, en la 11-a de aŭgusto 1912, Zamenhof diris: "(...) La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi. (...)".

Zamenhof (vidu foto dekstre) klarigis la kaŭzon de tiu decido:

"(...) Se al iu ne plaĉas mia persono aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉion, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, (...)".




Ĉu vi scias?



Antoni Grabowski
(1857-1921)


- La poemo "La Reveno de l' Filo" de **Antoni Grabowski** estis la prologo al la Krakova kongreso.
- La rusa revolucia gvidanto **Lenin** kaj lia edzino Nadeĵda partoprenis en la 8-a UK por subteni ligojn al la ĵurnalo "Pravda", eldonata en Rusujo.




Lenin (1870-1924)
partoprenis en la 8-a UK

Teatraĵoj Prezentitaj

- **Mazepa**, tragedio en 5 aktoj de Juliusz Slowacki. El la pola tradukis Antoni Grabowski. Prezentis profesia trupo el la Urba Teatro de Krakovo.
- **La Urso**, komedieto en unu akto de Anton Ĉeĥov. El la rusa tradukis Vasilij Devjatnin. Prezentis amatora trupo de la Zamenhofa Artista Adeptaro.
- Opero **Halka**. Muziko de Stanislaw Moniuszko. Teksto de Wolski. Prezentis profesia opertrupo el Lvov.



Ekskurso al la montara lago
Morskie Oko (Mara Okulo)
post la 8-a UK



Odo Bujwid

D-ro Odo Bujwid kaj la 8-a UK


D-ro Odo Bujwid (1857-1942) estis pola bakteriologo kaj universitata profesoro. Li studis kvar jarojn kun Zamenhof en la Universitato de Varsovio. Li ankaŭ studis ĉe Koch kaj Pasteur. De tiam li fariĝis internacie konata per siaj sciencaj artikoloj. Post la 1-a Mondmilito, li okupiĝis pri fabrikado de vakcinaĵoj.

En 1912 komenciĝis lia agado por Esperanto, kiam li fariĝis la prezidanto de la 8-a UK en Krakovo.

D-ro Odo Bujwid ofte sukcesis altiri favorojn por Esperanto kaj por la esperantistoj pro tio, ke li havis gravajn rilatojn en la regantaj medioj.

Propaganda Piedvojaĝo de Vasilij Devjatnin

Vasilij Devjatnin (1862-1938) estis rusa instruisto pri literaturo. Li esperantistiĝis en 1891. Kontribuis al la Fundamenta Krestomatio. Estis kunlaboranto de pluraj gazetoj, inkluzive de "La Esperantisto" kaj "La Ondo de Esperanto". Gajnis literaturajn premiojn. Fondis la unuan Esperantan teatrotrupon, "Zamenhofa Artista Adeptaro". En 1912, li piediris 42 tagojn de Parizo ĝis Krakovo, farante propagandon por la 8-a Universala Kongreso.



Vasilij Devjatnin



Ω

Fotoraporteto...

Alia Moskvo...

Moskvo estas ne nur Kremlo, malnovaj temploj, modernaj altegaj domoj, suvenir-vendejoj kaj amaso da aŭtoj kaj homoj en ĉiama bruo. Ĝi estas ankaŭ belegaj lokoj, kiujn turistoj ne vizitas kaj lokanoj ofte ne rimarkas pro hasto kaj kutimiĝo. Sed indas foje halti kaj atenti, admiri la belecon...

Irina MIRONOVA
teksto kaj fotoj



Ω

www.lakaravelo.com